

from melanoidins. — *Dev. Food Sci.*, 15, 291-299.

Yoshida, D.; Okamoto, H.; Kushi, A.; Fukuhara, Y.; Mizusaki, S. (1986): Mutagenicity of the heated products of nitrogenous compounds with the addition of glucose. — *Dev. Food Sci.*, 15, 335-341.

### **Maillard (1912) no Amino-Karbonil-Hannô no Sitizyûgonen.**

Kono Ronbun de wa Maillard no kantanna Denki to Hannô no Kikô (atarasii Setu o hukumu) o nobeta. Kono Hannô wa Husyoku no Meranoizin, Syokuhin no Iro to Kaori ni kansuru dake de naku warewareno Kenkô ni mo kakawatte iru.

## **Grava atentigo por la SR-abonantoj orienteŭropaj!**

La 39-a volumo (por 1988) de SCIENCA REVUO aperos en Pollando, danke al oferemo de la iniciatinto, d-ro *Tyburcjusz Tyblewski, Bartka Zwycięzcy 11/1, PL 58-500 JELENIA GÓRA*. Tiamaniere la SR-abonantoj el Sovetio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Germana DR, Bulgario, Hungario kaj Rumanio pli facile povos transpigi la monon al la supre indikita adreso.

ISAE esperas, ke per almenaŭ provizora SR-eldonado en orienteŭropaj landoj ĝi sukcesos iom sanigi sian financon staton.

## **Membiografieto de *Sin'itirô Kawamura***

En junio mi fariĝos 75-jara. Laŭ invito de nia ĉefredaktoro mi kuraĝas skribi ĉi tiun membiografieton.

Mi naskiĝis en 1912.06.06 kiel la unua filo de la patro *Kawamura Teizi* (1885.06.15-1950.06.16), inĝeniero pri ŝipkonstruado, diplomito de Inĝeniera Fakultato de Imperia Universitato de Tokio, kaj patrino *Kawamura* (antaŭe *Nakaiti Teru* (1889. 10.15-1983.09.22) en urbeto *Nohezi*, *Aomori*-Gubernio, la plej norda parto de *Honsyû* (Ĉefa Insulego) de Japanujo.

Ĉar mia patro laboris en *Oosaka*, mi finis kursojn de 6-jara elementa lernejo de *Suita*, *Oosaka*-Gubernio en 1923.03 kaj estis lernanto de *Ibaraki*-Mezlernejo en 1925.04-1929.03, kie interalie mi eklernis la anglan. En 1929.04 mi sukcesis fariĝi lernanto de Naturscienca Fakolo de *Dai San Kôtô Gakkô* (la Tria Nacia Kolegio) ĉe Kioto kaj tuj fariĝis membro de la Esperanto-Grupo (ne oficiala, sed la grupo organizita de antaŭuloj tre diligentaj kiel *Hideo Yagi*, iama prezidanto de UEA, estis aprobita de la kolegio). En la sekvanta jaro mi fariĝis instruanto de Esperanto en la elementa kurso de novaj grupanoj. En 1929 mi eklernis la germanan kiel la duan fremdlingvon (la unua estis la angla). Kvankam tiam ni ordinare lernis 3 jarojn en la t.e. Nacia Kolegio, mi restis lernanto tiea dum 4 jaroj. Min atakis la malsano tifo abdomena en 1931.09 kaj tenis en malsanulejo ĝis preskaŭ la fino de la jaro. Tamen mi utiligis la tempon. Mi memlernis la francan dum la liberaj 3 monatoj (1932.01/03).

En la tiama Imperia Universitato de Tokio mi estis studento en la Fakolo de Agrikultura Ĥemio de Fakultato Agrikultura dum 3 jaroj (1933.04-1936.03). Ni lernis sub famaj profesoroj, inkluzive profesoron *Suzuki Umetarô* (1874-1945), eltrovinto de orizanino, kruda vitamino B<sub>1</sub> aŭ tiamino. Li ek-



sprofesoriĝis en 1935. Mi studis sub prof. *Suzuki Bunsuke* kaj fariĝis baka-laŭro pri agrikulturscienco per la disertaĵo, “vitamino A en fridigita hepato de seriolo”.

En tiu tempo Japanujo estis en pli kaj pli danĝera stato, se ni rigardus pli poste. Tamen ŝajne ekonomiaj kondiĉoj ne estis malbonaj. Novaj baka-laŭroj povis esti facile dungataj. En 1936.04 mi fariĝis membro de esplora laboratorio de la kompanio, *Mansyū Daizu Seihin Kabusiki-Kaisya* (Kompanio de Manĉuriaj Sojproduktoj) ĉe *Kawasaki* tuj sude de Tokio. Mia laboro temis pri preparado de proteino el sengrasigitaj sojsemoj. La dua temo estis utiligado de la kromproduktaĵoj de proteinpreparado. Mi estis feliĉa povi labori en la laboratorio de prof. *Suzuki Bunsuke* (1939.04-1940.12). La kompanio estis aneksita de *Nippon Yusi Kabusiki-Kaisya* (Japana Kompanio pri Grasoj). Mi laboris en ties explorejo en *Oosaka* kaj studis interalie por prepari novan lavilon el grasacidoj kaj hidrolizato de proteino (1941.01.-1942.12). Mia laborejo ŝanĝiĝis al Tokia centra oficejo de la kompanio. En tiaj tagoj dum militaj mi laboris ĉefe pri literatura enketo por la kompanio.

Al mi venis iom da sentoj, ke mi ne taŭgas labori en explorejo de privata kompanioj. Por trovi la metodojn utiligi la kromproduktojn de proteinpreparado, ni devus intense studi pri la saĥaridoj de sojsemoj ne bone studitaj ĝis tiam, ĉar kvante la plej grava komponaĵo de la kromproduktoj estas ja saĥaridoj. Tamen tia studo ne donas profitojn al la kompanio tre baldaŭ. Tial mi eksiĝis el la kompanio.

Post la milito mi povis akiri postenon en privata universitato apud Tokio. En 1945.10.10 mi fariĝis vicprofesoro pri bioĥemio ĉe Agrikultura Fakultato de *Nihon-Universitato* ĉe *Huzisawa, Kanagawa-Gubernio*. Mi daŭrigis laboron pri saĥaridoj de sojsemoj. Samtempe mi gvidis studentojn en Esperanto-kursoj.

Post 6 jaroj en 1952.04 min invitis Gubernia Agrikultura Kolegio de *Kagawa*, kies profesoro mi fariĝis. Por mi estis la unua fojo (krom unufoja vizito nur kelktaga) transiri al *Kagawa* situanta en *Sikoku*, la plej malgranda el la plej grandaj kvar insulegoj de Japanujo (*Honsyū, Hokkaidō, Kyūsyū*, kaj *Sikoku*). Tamen mi akceptis la inviton. Mi komencis studi saĥaridojn de ne nur sojsemoj sed ankaŭ tiujn de faboj (*Vicia faba*). De tiam mi ne uzas la vorton sojfabo, ĉar fabo estas alia specio de viciacoj. Mi diras uzante la vorton sojo pri la planto aŭ semo de *Glycine hispida*. Poste miaj studoj

etendiĝis al aliaj manĝeblaj viciacoj.

Laŭ la ŝanĝiĝo de la sistemo de kolegioj kaj universitatoj publikaj, Gubernia Kolegio estis aneksita al Ŝtata Universitato. Mi fariĝis profesoro pri bioĥemio en Agrikultura Fakultato de *Kagawa-Universitato*. Mi daŭre studis pri saĥaridoj de viciacoj. En 1976.03 mi fariĝis 63-jara kaj eksiĝis el profesoreco de la universitato kaj fariĝis emerita profesoro tiea.

Mi ricevis doktorecon iom malfrue en 1961.05.18 per la disertaĵo, “Studio pri saĥaridoj de viciacoj”.

De 1976.04 mi estas profesoro de privata virina kolegio, *Meizen-Kolegio* ĉe Takamatu pri bioĥemio de nutrado.

Mi nun estas prezidanto de *Tyūgoku-Sikoku-Filio* de Japana Societo pri Amelscienco (de 1976.04) kaj prezidanto de *Tyūgoku-Sikoku-Filio* de Japana Societo de Nutrado kaj Scienco de Manĝaĵoj (de 1979.04). Mi ricevis premiojn de la du societoj en 1983.10.03 kaj 1971.05.08, respektive.

Mi partoprenis al la 9 Universalaj Kongresoj de Esperanto: Hago 1964, Tokio 1965, Hamburgo 1974, Ateno 1976, Rejkjaviko 1977, Varno 1978, Brazilio 1981, Antverpeno 1982, kaj Pekino 1986. Mi prelegis en la Internacia Kongresa (antaŭe Somera) Universitato ĉiufoje, escepte de tiu en 1981.

Pri miaj publikaĵoj en Esperanto, vidu mian saluton kiel prezidanto en *Scienca Revuo* 29, 3-5 (1978).

La tri sekvantaj aldoniĝas.

1978: Ekzameno de periodaĵoj en la kampo de aplikata bioĥemio. III. Fremdlandaj (nejapanaj) periodaĵoj pri ĥemio de animala nutrado. *Kagawa-ken Meizen Tanki Daigaku Kenkyū Kiyō*, 9, 22-33.

1984: Nutrado kiel branĉo de ekologio. *Heroldo de Esp.*, 15 (1738), *Ekologia Suplemento*, p. 2 (1984.12.05).

1985: Esenco de la scienco de nutrado. I-VIII. *La Revuo Orienta* (de Japana Esperanto-Instituto) 66, 110-111, 145-146, 174-175, 212-213, 241-242, 276-277, 304-305, 250-351.

Ĝis nun (1978.03.06) mi publikigis 91 originalajn verkojn, 20 librojn (inkluzive tiujn, en kiuj mi parte kontribuis), 37 literaturajn studojn, 59 popularsciencajn artikolojn, kaj 56 sciencajn revuojn. Mi skribis nature plejparte japane kaj iomete angle.



Laste, sed certe ne malplej grave, mi skribas pri mi en la rilato kun nia asocio, ISAE. Mi estas membro ekde antaŭ la mondo-milito, estadis japana delegito en 1966-1982, estis prezidanto en 1978-1980, vicprezidanto en 1981-1985, kaj ankoraŭ estrarano (1986-).

*Sin'itirô Kawamura*

### Noto de la ĉefredaktoro

Mi kaptas ĉi okazon por gratuli kaj varme danki la karan jubileulon pro lia impona scienca verkaro, kiu alten levas ankaŭ la reputacion de ISAE. Same mi dankas pro lia oferemo pri nia asocio. Longe li estu sana kaj feliĉa!

*J. Kavka*

## Oficialaj informoj de AE (Akademio de Esperanto)

*Sendependa lingvo-instituto  
fondita de d-ro L.L. Zamenhof en 1905*

Post studo kaj propono de sia Gramatika Sekcio, AE voĉdone akceptis jenan rezolucion:

1. Post ita/ata/ota- vorto, la aganto estas indikita per **de**. Ekz. ŝi estas amata de ĉiuj. (6-a regulo de la fundamenta gramatiko.)

2. Post o-vortoj, **de** povas indiki la aganton, se neniu alia koncernanto estas ebla. Ekz., la kanto de la birdoj, la projekto de la inĝenieroj (Fundamento), la parolado de la oratoro, k.s.

3. Por indiki la aganton post o-vortoj en aliaj okazoj, la plej ĝenerale akceptita formo estas **fare de**. Ekz. la akcepto de la kongresanoj fare de la urbestro; la traduko de Hamleto fare de *Zamenhof*.

La direktoro de la sekcio  
pri gramatiko  
*Michel Duc Goninaz*

La presidanto  
d-ro *André Albault*  
(21, rue de Verfeil,  
F-32100 TOULOUSE,  
Francio)

## Esperantlingva nomenklature de la fungogenro rusulo

*Josef Kavka (Ĉeĥoslovakio)\**

### 1. Enkonduko

Ekde mia knabaĝo mi estas interesata pri mikologio; fakte ĝi inaŭguris mian tutvivan orientitecon al la naturhistorio. Kvankam tiu ĉi orientiteco iom post iom fariĝis pli geologia ol biologia, tamen eĉ nuntempe mi sentas devon kontribui al esperantlingva literaturo fungosciencia, tiom pli, ĉar ĝi restas ĝis hodiaŭ tre malriĉa.

### 2. Rusuloj

La genro **rusulo** (*Russula Pers. ex S. F. Gray*), angle *russula*, france *russule*, hispane *rusula*, estas unu el la plej bone esploritaj fungogenroj. Kun la genro **laktario** ĝi apartenas al la familio de la **rusulacoj** (*Russulaceae Roze*), tre homogena grupo, klare distingebla, eĉ konsiderinde izolita disde la ceteraj **agarikaloj** (lamenhavaj bazidiomicetoj). Nuntempe oni konas preskaŭ 300 rusul-speciojn (el tio 200 en Eŭropo), por kies esploro oni dankas al diverslandaj specialistoj (v. la literatur-elekton). El la modernaj verkoj apartan atenton meritas tiu de *Romagnesi* (1967). Laŭ la sistemo de ĉi aŭtoro mi nun pritraktu — el la vidpunkto nomenklatura — la speciojn plej gravajn (81).

La problemecon ligitan kun esperantigo de la botanika nomenklature mi tuŝis jam antaŭ nelonga tempo (1982). Tiam mi emfazis la principon, ke la esperantlingva nomenklature laŭeble plej fidele imitu la internacie normigitan kodon de la nomenklature latinlingva. Tiam mi skribis, ke “la rekonebleco estas ĉi-okaze pli grava ol la vortsignifo” kaj ke “multaj latinaj epitetoj jam perdis sian semantikan elvokivecon”.

\* D-ro de natursciencoj, kandidato de teknikaj sciencoj, emerita ĉefo de specialgeologia esplorcetro, *Lužná 7, 160 00 Praha 6 - Vokovice*.